

## La vivo kaj verkado de blinda esperantisto Eroŝenko kiel ekzemplo de la interkultura dialogo

### 1. Limigo kiel avantaĝo

Invalido, senpova, senhelpa... En la nuna tolerema mondo ne decas tiel paroli pri la homoj kun fizikaj difektoj. Nun oni delikate nomas ilin homoj kun limigitaj fizikaj eblecoj. Limigitaj eblecoj... Kiam mi pensas pri Vasil Eroŝenko en tiu aspekto, mi spertas kognan disonancon. La homo kun limigitaj eblecoj memstare ekposedis pli ol dekon da lingvoj, travojaĝis duonmondon – Reĝan koleĝon por blinduloj en Londono, Japanio, Ĉinio, Birmo, Hindio, Belgio, Germanio, Ĉukotko kaj Turkmenio – kaj ĉie sen kondukanto, kreis amason da literaturaj verkoj, aŭtoris multajn metodikajn materialojn. Ĉu multaj homoj kun nelimititaj fizikaj eblecoj povas sin laŭdi almenaŭ per parto de tiaj atingoj? Do, ĉu fizikaj difektoj estas limigoj? Aŭ eble male – ili malfermas novajn senlimajn eblecojn?

### 2. Lingvo kiel ĉefa informkanalo

La homo havas ses eksterajn sensojn. Ĉe tio la vida perceptokanalo ricevas 30% de informado kaj la aŭda nur 10%. Atentu, ke la vidkanalo ricevas trioble da informado ol la aŭda. Imagu do al vi la staton de la homo, al kiu mankas ebleco ricevi trionon de informado el ĉirkaŭa mondo! Ne estas sekreto, ke la organismo de la homo senigita de iu senso, penas kompensi ĉi perdon je la kalkulo de plia uzado de aliaj sensoj. Ekzemple, la nevidantaj homoj kutime havas akran aŭdadon, tre sensitivajn fingrojn ktp. Ankaŭ Eroŝenko ne havante eblon vidi la ĉirkaŭan mondon, disvolvis eksterordinare siajn lingvokapablojn, kio permesis al li aktive komuniĝi kun vasta homa rondo kaj ricevi plian informadon de la ĉirkaŭa mondo. Sed li ne limigis sin per ricevo de informoj de ekstere. Li mem iĝis la fonto de altvaloraj informoj por la mondo. Eroŝenko kiel spongo ensorbadis en si ĉion, kion povis tuŝi, ŝanĝadis sian opinion, tralasadis tra si impetan torenton de scioj, sperto, sentoj kaj poste transformadis ĝin en ion tute alian – vortojn, muzikon, scipovon, saĝon kaj en tiu ĉi vortico de naskiĝo de novo ĉiam interplektiĝadis diversaj popoloj kaj kulturoj, inter kiuj Vasil ne vidis limojn diference de multaj vidantoj. Ĉe tio Vasil Eroŝenko

ĉiam skribis pri si „ukraino“, ĉar la avo kaj la patro estis ukrainij kaj ĉiam parolis hejme ukraine.

### 3. Unu verkanto – kvar lingvoj

Kiel jam estis menciite, Eroŝenko sukcesis ekposedi pli ol dudek lingvojn, inter alie la anglan, francan, japanan, tajan, birman, ĉukotkan, ĉinan, turkmenan, hindan, puŝtuan, palion, Esperanton, latinon.. Precize ilia nombro ne estas konata, sed konsiderante la vastan geografion de liaj vojaĝoj kaj tion ke li ĉie okupis sin pri praktika scienca agado ĝuste en la lingvosfero oni povas imagi al si kapablojn de tiu ĉi homo-poligloto. Tiel estiĝis la sorto, ke plimulto da krea heredaĵo de Eroŝenko pro tiaj aŭ aliaj kaŭzoj estis neniigita. Nuntempe estas ĝuste sciate, ke por verki siajn literaturaĵojn li aktive uzis la rusan, la ukrainan. la japanan kaj la anglan lingvojn.

La lingvo estas respegulo de la kulturo. Ĝuste pro posedo de multaj lingvoj Eroŝenko scipovis tuŝi „la originalojn“ de diversnaciaj kulturoj, kaj poste donaci la samajn sensaĵojn al aliaj homoj. Tiel okazadis tio, kion ni nomas hodiaŭ „interkultura dialogo“ kaj kondukanto de ĉi dialogo estis nevidanta, sed tiel sagaca Vasil Eroŝenko. Hodiaŭ indas al ni lerni ĉe li. Lerni kompreni, akcepti, pardoni unu la alian, lerni imerkomunikiĝi malgraŭ eksteraĵo, raso, sekso, aĝo, difektoj, lerni vidi tion, kio ne estas videbla per la okuloj. Ja malantaŭ la tiel nomata batalo de la kulturoj, laŭ la opinio de Eroŝenko, staras egoismo, nedeziro ekkoni kaj kun infana sciavido iri rekonten unu al la alia.

### 4. Neinfaneca filozofio de porinfanaj verkoj

En Japanio oni konsideras Eroŝenkon klasikulo de la porinfana literaturo. Ĉe tio notindas, ke verkis li ĝuste japane, sed ne japanigis. La japana, kiel ankaŭ aliaj orientaj lingvoj, estas la lingvo de alegorioj kaj bildoj. Pro tio la aplikata de Eroŝenko ĝenro pleje respondas al ĝia specifeco. Fabeloj, legendoj... „Fabel’ as elpensaj”, sed ĝi aludas...“. Ni alkutimiĝis rigardi porinfanajn verkojn kiel io tre simpla kaj neprofunda. Fakte ni neniam revenas al ili en adolta aĝo, Sed konsideri tiel estas grandega eraro. Ĉar verki tiele, ke teksto estu komprenebla eĉ por eta infano kaj samtempe provizi ĝin per profunda filozofia

enhavo estas vera arto de la verkinto. Kaj se vi legos la fabelojn kaj legendojn de Eroŝenko, vi facile konvinkiĝos pri tio.

5. La plej malmulte konata fakto el la malmulte konataj  
Jam temis pri tio, ke preskaŭ ĉio verkita de Eroŝenko, pri kio ni almenaŭ scias, senrevene malaperis. Ĉe tio ni scias, ke li faris unikajn agojn, sed kiel li faris, estas enigmo. Ekzemple, li iradis sen bastono eĉ en nekonataj lokoj, sed kompreni ke li estas blinda eblis nur atente rigardi lin vizaĝo kontraŭ vizaĝo. Bedaŭrinde, lia metodiko por instrui blindulojn pri sendependeco de movoj estis perdita. Same kiel la metodiko pri instruado de fremdaj lingvoj – ne prizirgataj blindaj infanoj, kiujn li instruis, post unu jaro flue parolis la anglan kaj la japanan.
6. Valoraĵoj sen daŭro de uzebleco  
Eroŝenko vivis kaj verkis en la komenco de la pasinta jarcento. Do, ĉu ni ne penas fosi ion malnovan, ne bezonatan, polvolovritan? Ĉu ĝis nun aktualas tio, kion li faris, pri kio skribis, per kio vivis? Por respondi tiujn ĉi demandojn, komence necesas respondi la aliajn. Ĉu ĝis nun maltrakviligas nin la demandoj pri bono kaj malbono, pri kredo je hela estonteco, pri prizorgado de maplpli fortaj socianoj, pri bonfareco k.s.? Se via respondo estas jesa, nepre trovu ekzempleron de Eroŝenko-verkoj. Kaj liaj sensivaj fingroj de blindulo tuŝos la kordojn de homeco en via koro.